Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 7 Decembro 2020



**Ĉi-numere:**

- Flagoj flirtantaj ĉe nenies tero.
- Flagoj de la ribelo de la Varsovia Geto.
- La simbolo de la skoltoj.
- Uzo de la E-flago okaze de prelegoj.
- La blazono de Franca Polinezio.
- Buntaj flagetoj en Tibeto.
- Flagoj kaj Poŝtmarkoj
- Asocio VENTO baldaŭ realaĵo.

PARTOPRENU
EN LA FONDIĜO
DE VENTO
(Vd. paĝon 36-an)

# VENTO

## Veksilologia revuo en Esperanto

Eldonita de Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Adresoj: 💻 cordoba@esperanto.ac
✉ Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editada en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
*Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.*

**ENHAVO** Paĝo


| | |
|---|---|
| Flagoj flirtantaj ĉe nenies tero | 3 |
| Flagoj de la ribelo de la Varsovia Geto 1943 | 9 |
| La simbolo de la skoltoj | 13 |
| Lastaj informoj pri flagoj | 17 |
| La Fotografaĵo de niaj Legantoj | 22 |
| Uzo de la Esperanto-Flago okaze de prelegoj | 23 |
| La Angulo de la Blazonoj: *Franca Polinezio* | 26 |
| Buntaj Flagetoj en Tibeto | 28 |
| Flagoj kaj Poŝtmarkoj: *Flagoj de okupaciitaj landoj eldonitaj de la Usona Poŝt-servo* | 31 |
| Veksilologia Terminaro | 34 |
| La Asocio *VENTO* baldaŭ iĝos reala | 36 |
| Kiel kunlabori kun *VENTO* | 38 |
| Flaga Humuro | 39 |


*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentantaj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta homaro.*

# Flagoj flirtantaj ĉe nenies tero

José M. Rodríguez (Hispanio)

Ne ekzistas en la mondo regiono kiu nun aŭ antaŭe ne estis disputata de unu aŭ alia regno. Ofte princoj aŭ reĝoj, respublikoj aŭ imperioj luktas por posedi kelkan ter-pecon aŭ insulon kaj tiuj luktoj, bedaŭrinde, fariĝis kruelaj militoj. Tiusence la fondiĝo de Unuiĝintaj Nacioj kaj la Internacia Kortumo metis iom da ordono en ĉi tiu afero, tamen ankoraŭ nuntempe okazas militoj sub la ekskuzo okupi terpecon aŭ regionon en la alta maro.  Sed ekzistas malgranda escepto al ĉi tiu konstanta regulo lukti por posedi ter-pecon aŭ insulon, temas pri *Bir-Tawil* (esperantigita Bir-Taŭil), regioneto inter Egiptio kaj Sudano.

Bir-Taŭil en la araba lingvo signifas *"alta akva puto"*. Ĝi estas 2,600 $km^2$ areo kiu troviĝas meze de la landlimo inter tiuj du afrikaj ŝtatoj. Neniu homo oficiale loĝas tie kaj nekredeble nek Sudano nek Egiptio deklaras siajn suverenecajn rajtojn sur la teritorio.



Bir-Taŭil troviĝas apud la Triangulo *Halaib*, ĉi lastan terpecon ambaŭ ŝtatoj pretendas. Do, ili celas posedi *Halaib* kaj samtempe ili lasas Bir-Taŭil por la alia, tio signifas, ke neniu el ili reklamacias Bir-Taŭil. Do, ĝi estas *terra nullius* (tero nenies). La malakordo okazis kiam Egiptio kaj Sudano fiksis siajn limojn inter 1899 kaj 1902.


Kiel dirite, neniu ŝtato proklamis siajn suverenecajn rajtojn sur la teritorio, pro tio pluraj homoj kaj organizaĵoj klopodis krei sur tiu teritorio iaspecan mikronacion. Kompreneble neniu el tiuj proklamoj estis serioze agnoskataj de la internacia komunumo, krome, pro la malfacila klimato de la regiono, varmega dezerto kaj pro la fakto, ke ĉiuj postulantoj loĝas fore de la regiono, foje tiuj deklaroj eĉ okazis interrete, neniu registaro aŭ internacia organizaĵo akceptis tiujn petojn.

Tamen, la afero estas interesa el la veksilologia vidpunkto, pro la fakto ke, kompreneble ĉiuj "teritoriaj reklamacioj" diskonigitaj, sciigis unualoke la flagon de la pretendanto. Foje la starigo de la flago estis la sola akto okaze de la reklamacio, kvankam estas necese diri, ke ofte tiuj flagoj flirtis nur dum horoj, aŭ eĉ minutoj en Bir-Taŭil. Ni vidu la flagojn kiuj iam flirtis en la teritorio.



Jen la unua flago flirtanta en Bir-Taŭil en la jaro 2011

La unua flago flirtanta sur Bir-Taŭil estis tiu starigita de la ĵurnalisto Jack Shenker. En la jaro 2011 li akompanis al egipta reĝisoro por produkti televid-raporton pri ĉi tiu teritorio. Shenker starigis tie flagon, kvankam estas necese diri, ke ĉi ĉio aperis sur la scenaro de la televid-programo, do li neniam efektivigis teritorian reklamacion favore al si mem.  Sur la flago aperas du trianguloj, sube verda kaj supre ruĝa, sur la centro videblas nigra cirklo kaj ene de ĝi flava dezerta vulpo.



Flago starigita en Bir-Taŭil en la jaro 2011
fare de Jack Shenker

La unua teritoria reklamacio naskiĝis el tre bela "preskaŭ *Disneja"* historio. Jeremiah Heaton estas usonano kiu en la jaro 2014 promesis al sia eta infano esti princino en reĝlando. Li serĉis la plej taŭgan lokon sur mapo por krei regnolandon kaj li trovis Bir-Taŭil, la teritorio nenies dezirata. Do, li imagis proklami la regnon "Norda Sudano".  Tion li ne faris el la distanco, ĉar la 16-a de junio 2014 li alvenis en Bir-Taŭil kaj li starigis novan flagon meze de ŝtonoj en la dezerto. Por "oficialigi" la novan ŝtaton li petis 250.000 dolarojn al eblaj interesitoj pere de intereto.  Li ne atingis tiun mon-kvanton, sed ja estis granda sukceso la ricevo de pli ol 10.000 dolaroj  havigitaj de tiuj kiuj deziris establi malgrandan ŝtateton ene de afrika dezerto.

Rilate la flagon de la regnolando "Nova Sudano" estas necese diri, ke ĝi ŝajnas esti ne nacia flago, sed familia flago.



Flago de la regnolando "Nova Sudano" elpensita por la teritorio Bir-Taŭil en la jaro 2014 de usonano Jeremiah Heaton

Unualoke estas necese diri, ke ĝi estas simila al flago de la ŝtato Virginio, tie loĝas la familio Heaton, do okulfrape Jeremiah Heaton dezajnis la flagon de la regnolando Nova Sudano surbaze de la standardo de tiu usona ŝtato. Meze de la flago aperas krono, sciate, ke la fondiĝo de tiu "revata" regnolando estis la deziro de S-ro Heaton princinigi sian filinon Emily, do, reĝa krono estas tute nepra en tiu mikronacio. Super tiu granda krono aperas sola flava stelo, reprezentanta la reĝon de "Nova Sudano" kaj sube aliaj tri blankaj steloj, ĉar tri estas la filoj de S-ro Heaton (aŭ pli bone diri Lian Reĝan Moŝton Jeremiah).



Jeremiah Heaton starigis sian flagon en la dezerto de Bir-Taŭil




Flago de la ŝtato Virginio en Usono




*Reĝo* kaj *Princino* antaŭ la flago

En la jaro 2017 okazis la dua surlanda "reklamacio" de la teritorio Bir-Taŭil. La ĉefrolulo estis Suyash Dixito, hinda informadikisto, kiu vizitis Egiption okaze de internacia kongreso. Li vizitis Bir-Taŭil kaj li proklamis sin reĝo de tiu nova regno-lando. Krom la hisado de flago li planktis semon, ĉar laŭ hinda tradicio la tero apartenas al tiu kiu planktas semon en ĝi. La flago flirtanta dum kelkaj horoj reprezentas la kolorojn de la sablo dum la mateno kaj la vespero, meze de la flago aperas mezepoka blazono. La koloroj havas klaran signifon, ĉar la teritorio estas tute dezerta, tamen la blazono ne estis bona elekto, ĉar kruco tute ne rilatas al la islama kulturo, ni ne forgesu ke Bir-Taŭil estas ĉirkaŭigita de islamaj ŝtatoj. Krome, la aŭtoro neniam klarigis la signifon de tiu kvar krucoj uzitaj en la dezajno de la blazono.






Suyash Dixito en Bir-Taŭil en la jaro 2017





Flago starigita en Bir-Taŭil fare de Suyash Dixito

Sur interreto estas eble trovi aliajn flagojn proponitaj, kaj sube aperantaj, por Bir- Tawil, teritorio pri kiuj kelkaj homoj revis krei vitualan ŝtaton, tamen nur ĉi tiuj 3 flagoj iam flirtis sur la dezerta teritorio.





# Flagoj de la Ribelo de la Varsovia Geto 1943

Lukas Toczki

En la jaro 1943 malgrandaj grupoj de judaj junuloj luktis kontraŭ la naziaj trupoj en Pollando, ĉefe por eviti arestojn kaj deportojn. Tamen, preskaŭ ĉiuj judoj malkonfidis pri tiuj grupetoj, pro la fakto, ke oni pensis, ke la malbonega situacio de la juda popolo en Pollando eĉ fariĝus pli terura, se la nazioj estus ĝenataj de tiuj grupoj. Krome, la Juda Konsilio de Pliaĝuloj, formita de judaj gvidantoj enkondukitaj de la germanaj okupaciantoj post la jaro 1939, preferis iamaniere kunlabori kun la nazioj kaj tiel eviti pliajn damaĝojn al la juda popolo en Pollando.



Flago uzita de la Juda Konsilio en Pollando

Tamen, komence de la jaro 1943 la ĉefa estro de tiu konsilio, Adam Czerniaków, mortigis sin post rifuzi la havigon al la naziaj okupantoj de listo kun nomoj de miloj da judaj infanoj. Ĝuste tiam, la varsoviaj judoj komprenis, ke verŝajne la nura solvo por eviti amasan murdigon de judoj fare de naziaj soldatoj estis lukti kontraŭ ili.  Tiam

du grupoj de judaj rezistantoj, preskaŭ ĉiuj ili junaj, ekigis lukton kontraŭ la nazioj en la ĉefurbo Varsovio. Temis pri la ribelo de la varsovia geto okazinta de la 19-a ĝis la 23-a de aprilo de la jaro 1943.

Unu el tiuj grupoj estis la Juda Militista Asocio (JMA), en la hebrea lingvo ארגון צבאי יהודי. Temis pri armita formacio de polaj judoj, kreita fine de 1939 de eksaj oficiroj de la pola armeo kaj de judaj cionistoj. Ĉi tiu organizaĵo reprezentis dekstran movadon de cionismo kaj al ĝi apartenis komence polaj oficiroj kaj suboficiroj de juda deveno. En la jaro 1940 la asocio nombris 100 membrojn kaj en la momento de la ribelo de la Varsovia Geto ili disponis pri 300 luktantoj.




Flago de la Juda Militista Asocio

Post la milito oni decidis silenti pri ĉiuj agadoj de ĉi tiu grupo, ĉar la nova pola reĝimo preferis elstrigi la lukton de alia grupo: la Juda Batal-Organizo, tie aniĝis judaj socialistoj.


Juda Batal-Organizo -JBO-, en la hebrea lingvo ייִדישע קאַמף אָרגאַניזאַציע, fondiĝis en la jaro 1942 kaj ties celo estis instigi la judojn al la lukto kontraŭ la nazioj kaj ne *"morti kiel ŝafoj survoje en la buĉejon"*. Malgraŭ la fakto, ke ili apenaŭ disponis pri kelkaj armiloj, ĉi tiu grupo sukcesis okaze de kelkaj atakoj kontraŭ naziaj soldatoj dum deportoj.

Juda Batal-Organizo estis konsiderata kiel maldekstra cionisma organizo, tre proksima al idealoj de Sovet-Unuiĝo.



Flago de la Juda Batal-Organizo


Alia grava grupo luktanta sur la stratoj de la Varsovia Geto estis la Pola Enlanda Armeo, pollingve *Armija Krajowa*. Ĝi estis armita forto aganta kaŝite dum la dua mondmilito kontraŭ la germana okupado de la pola ŝtato. Temis pri forta kaj bone organizita subtera armeo kiu, kvankam ĝi ne sukcesis instigi polojn al ĝenerala ribelado, ĉi tiu armeo ja provokis damnaĵojn al la invadantoj pere de sabotado. Laŭdire ĉi tiu grupo estis la plej efektiva kaj sukcesa armeo lukanta kontraŭ la nazioj en Eŭropo el la gerila vidpunkto.



La literoj “P” kaj “W” sur pola flago, kun la signifo *Polska Walczaca* “Luktanta Pollando”, jen la standardo de la Pola Enlanda Armeo

La ribelo de la Varsovia Geto komenciĝis en la monato aprilo 1943. Tiam la nazioj ekigis la finan deporton de ĉiuj judoj tie troviĝantaj. Ĉi tiuj estis preskaŭ 30.000 homoj kiuj kaŝiĝis ĉe subteraj bunkroj, kvankam ĉi tiuj kaŝejoj malebligis kian ajn fuĝon. Kiam la germanaj soldatoj eniris en la geton, ili trovis neniun homon surstrate. Ĝuste tiam ili ricevis pafadon el la fenestro de la domoj kie troviĝis la gerilistoj. Nazioj retiriĝis, tamen baldaŭ ili pripensis novan taktikon, la bruligon de ĉiuj konstruaĵoj en la geto. Post kelkaj tagoj la nazioj sufokis ĉian reziston.

En la jaro 2015 forpasis Juta Hartman, unu el la lastaj supervivantoj de tiuj kiuj luktis en la geto. Por agnoski kaj diskonigi tiun lukton la israela ministro Moshe Arens publikigis libron en la jaro 2000 sub la titolo *"Flagoj sur la Varsovia Geto"*. La nomo de la libro naskiĝis post la diraĵo de S-ino Hartman, ŝi asertis, ke la judoj starigis siajn flagojn en la geto kaj la nazioj ne povis kapti ilin facile.



# La simbolo de la skoltoj

✍ Cristina Bollini (Italio)

Ĉu vi jam vidis knabojn, en pantalonetoj (eĉ vintre), kiuj kantas dum marŝado? Eble jes, verŝajne vi eĉ pensis -kun rideto- *"Kiuj estas ĉi tiuj? Ĉu ili estas frenezuloj?"*. Ne, ili estas skoltoj. En Italio la uniformo de la skoltoj estas blua, sed en aliaj landoj ili eble uzas aliajn kolorojn (verdo aŭ bruno), sed ĉiuj ili, absolute ĉiuj, uzas la saman simbolon.



Robert kaj Olave Baden Powell

Robert Stephenson Smyth Baden Powell, generalo de la brita armeo, fondis en la jaro 1907 la skoltan movadon (por viroj) kaj la skoltinan movadon (por virinoj). Lia edzino (Lady Olave) superrigardis la virinan movadon. Hodiaŭ, en multaj landoj ambaŭ movadoj unuiĝis (en Italio nomiĝas AGESCI), kaj ili ankoraŭ havas malsamajn simbolojn, tiuj adoptitaj de la fondinto.

La simbolo de la skoltoj estas lilio kaj la trifolio estas tiu de la skoltino (alidirite “gvidistinoj”).

Multaj skoltaj asocioj en la mondo, eĉ oni povus diri preskaŭ ĉiuj, adoptas kaj la lilion kaj la trifolion kiel proprajn simbolojn.

AGESCI uzas lilion surmetitan al simbolo de trifolio.

Lordo Baden Powell uzis lilion kiel simbolon, ĉar ĝi estas uzata en la kompaso kaj “ĝi ĉiam direktiĝas al la ĝusta vojo (kaj supren)”. Ankaŭ sur la trifolio, la venjo sur la centro de la desegnaĵo, kiu direktiĝas supren, simbolas la kompason.

La tri pintoj de lilio kaj la tri petaloj de trifolio rememoras tiujn tri punktojn de la skolta promeso. La du steloj simbolas veron kaj konon. La dek pintoj de la du steloj rememoras la dek punktojn de la skolta leĝo.

Sur la blazono de AGESCI la ŝnuro reprezentas la unuiĝon de ĉiuj skoltoj en la mondo, kaj la ringo, ĉirkaŭanta la desegnon, rememoras la ligon de frateco inter ĉiuj skoltoj. Fakte, skoltoj devas senti sin fratoj sub komuna leĝo, eĉ se ili sekvas malsimilajn religiajn kredojn.

La plata nodo (sub la blazono) simbolas la forton de la skoltismo en la mondo kaj ĝi rememoras la "bonfaron", kiun ĉiu skolto devas plenumi ĉiutage.

**La skolta promeso** (la pintoj de lilio kaj la petaloj de trifolio).

Jen la Esperanta versio, kiun ĉiu skolto, memvole, deklamas:

*"Je mia honoro mi promesas, ke laŭ mia povo:*

1) *Mi plenumos miajn devojn al Dio kaj al mia patrujo.*
2) *Mi ĉiam helpos aliulojn.*
3) *Kaj mi obeos la skoltan leĝon."*

En Italio, la versio uzata fare de AGESCI aldonas la vortojn *"Kun la helpo de Dio"* ĉe la komenco de la teksto.

**La skolta leĝo** (la dek pintoj de la du steloj).

Jen la Esperanta versio (laŭlande, la dirAĵo varias, pro religio aŭ lingvo).

*"Skolto kaj skoltino*

1) *Estas fidindaj.*
2) *Estas lojalaj.*
3) *Devas esti utilaj kaj helpemaj.*
4) *Estas amikoj de ĉiuj kaj fratoj de ĉiuj aliaj Skoltoj.*
5) *Estas ĝentilaj.*
6) *Estas amikoj de bestoj.*
7) *Obeas ordonojn.*

8) *Ridetas kaj fajfas malgraŭ malfacilaĵoj.*
9) *Estas ŝparemaj.*
10) *Pure pensas, parolas kaj agas.*

Oni diras: “Iam skolto, ĉiam skolto”...





# Lastaj informoj pri Flagoj

## Ĉagosanoj flirtigas sian flagon post la juĝo de la Internacia Kortumo.



La Ĉagosa insularo estas arkipelago meze de la Hinda Oceano. Ĝi konsistas el sep atoloj enhavantaj entute pli ol kvindek insulojn. Ĝis la jaro 1965 ĉi tiu teritorio estis parto de la brita kolonio Maŭricio, tamen en tiu jaro la metropolo decidis krei novan kolonion sub la nomo "Britaj Teritorioj en la Hinda Oceano".

Maŭricio sendependiĝis de Britio en la jaro 1967, la nova ŝtato ĉiam sopiris revenigi la insularon en Maŭricion. Britio kreis tiun novan kolonion ĝuste antaŭ la sendependiĝo de Maŭricio, pro la fakto, ke Usono decidis starigi gravan milit-bazon ĉe unu el la insuloj, ĝuste sur

Diego García. Ofte, Maŭricio plendis ĉe internaciaj organizoj pri tiu teritoria disigo.

La pasintan jaron la Internacia Kortumo juĝis, ke la sendependiĝo de Maŭricio ne estis tute efektivigita, ĉar la insularo Ĉagos estas parto de Maŭricio kaj tiu teritorio ankoraŭ troviĝas sub la brita suvereneco. Tiu juĝo favorigas la reklamaciojn de la enloĝantaro de la ĉagosa arkipelago, kiu estis forpelita de la britaj aŭtoritatuloj por konstrui usonan milit-bazon. Tiel, okaze de iliaj reklamacioj la ĉagosanoj flirtigis sian flagon tutmonde.



Flago de la Ĉagosa Insularo


## Kia flago por la jida lingvo ?

Basile Millet (Francio)

Unue, indas sin demandi, ĉu lingvo bezonas flagon. Jes, laŭ *Duolingo*, kiu planas krei anglalingvan kurson pri la jida lingvo. La laborgrupoj de *Duolingo* opinias, ke flago, uzata kiel simbolo, necesas, por ke homoj rekonu lingvon.

Jam ekzistas flago por tiu lingvo, temas pri la flago de la aŝkenazaj judoj (judoj en aŭ el centra aŭ orienta Eŭropo). La aŝkenazoj historie

parolas la jidan. Sed pro la religia simbolo, *Duolingo* opinias, ke ĝi ne estas taŭga flago. La *Duonlingo*-skipo pri la kreado de la kurso pri la jida pensas, ke estas ankaŭ nereligiaj jidlingvanoj, kaj oni ne volas ekskludi ilin.



Flago de la aŝkenaza judaro

Tial skipanoj decidis demandi helpon al retanoj por nova flago. Malsimpla afero estas: la flago devas esti neŭtrala ankaŭ politike.

Estas kaj cionistaj jidlingvanoj kaj necionistaj jidlingvanoj, pro tio, laŭ la vidpunkto de Duolingo, ne devas esti referencoj al israela ŝtato en la flago.

Kia flago por la jida lingvo?

## Malhisado de la brita flago en la Eŭrop-uniaj institucioj.

Kelkaj minutoj post la 20-a horo, en Bruselo (Belgio) de la pasinta 31-a de januaro komenciĝis la malhisado de la britaj flagoj ĝis tiam flirtantaj en la sidejoj kaj oficejoj de Eŭropa Unio. Ĉi tio okazis pro la *briteliro*, tio estas, la forlaso de la Eŭrop-uniaj institucioj fare de Britio.

Unu el la flagoj kiuj troviĝis ekstere de la Eŭropa Parlamento estos montrata en la Muzeo de la Eŭropa Historio. La malhisado okazis ne-solene, tio estas sen himnoj, tutsilente.



La brita flago jam ne flirtas en la sidejoj de Eŭropa Unio

## La lukto kontraŭ la koron-viruso jam havas propran flagon.

La slovena veksilologia asocio *Heraldica Slovenica* dezajnis specialan flagon kontraŭ la koron-viruso. La ideo naskiĝis en Belgio, tie blankaj flagoj flirtis en publikaj konstruaĵoj por apogi la sanitarajn servojn en lukto kontraŭ ĉi tiu terura malsano.

Do, al tiu blanka flago oni aldonis la bluan serpenton de Asklepio kaj ĵus rompitan kronon. Asklepio estas konsiderata de la helena mitologio kiel la dio de la medicino kaj li estas reprezentata pere de serpento. Pri la rompita krono, ĝi simbolas la venkon kontraŭ la kron-viruso, aŭ koron-viruso.

## VENTO, veksilologia revuo en esperanto

Uroš Žižmund, sekretario de *Heraldika Slovenica* diris, ke la flago celas esprimi nian grandegan dankemon kaj apogon al kuracistoj, flegistoj kaj ĉiuj aliaj sanitaraj laboristoj kiun prizorgas nian socion en la lukto kontraŭ la epidemio.



Flago proponita de *Heraldika Slovenica* por agnoski kaj omaĝi la laboron de la sanitaraj servoj en ilia lukto kontraŭ la koron-viruso

---




La revuo **VENTO** aperas trifoje en la jaro: *aprilo – aŭgusto – decembro.*

Ĝi estas libere legebla ĉe la TTT-paĝo:

www.esperanto.ac/vento

# La fotografaĵo de niaj legantoj



Jen kartvela flago en la ambasadejo de ĉi tiu ŝtato en Madrido (Hispanio). Dato de la fotografaĵo *Januaro 2020.*

La "flago de la kvin krucoj" estis adopita de la kartvela parlamento en la jaro 2004. Ĝi estis formale apogita de prezidenta dekreto, post lia elekto kiel Prezidanto de Kartvelio. La adopto de ĉi tiu flago kaŭzis grandan polemikon en la lando, pro la fakto, ke ĝi estis simbolo de politika partio.




# Uzo de la Esperanto-flago okaze de prelegoj

José M. Rodríguez (Hispanio)


Okaze de E-kongresoj aŭ renkontiĝoj ofte esperanto-flago estas metita post, antaŭ aŭ apud la preleganto. Ŝokas vidi kiel iufoje tiu flago estas pendigita vertikale, alifoje horizontale, kelkfoje eĉ pendita de kie ajn. Verŝajne estus necese, el la protokola vidpunkto, akordigi kiamaniere meti nian flagon, kaj eĉ aliaj, okaze de esperantista prelego.

Unue ni kreu scenejon. Ni troviĝas ĉe fermita salono, publiko aŭskultos preleganton kiu uzos pupitron por apogi sian kajeron, libron aŭ notojn uzotajn dum la prelego.  Jen eblaj situacioj se E-flago estas metita apud, post aŭ antaŭ li:




- Preleganto uzas pupitron kaj oni decidis meti E-flagon apud li. Atentu, oni decidis meti NUR esperantistan flagon, tute ne aliajn standardojn, ekz. nacia, regiona, urba, ktp.  Ĉi-kaze E-flago estos metita dekstre de la preleganto, tio estas, maldekstre de la publiko aŭskultanta.


- Oni decidas meti pliajn flagojn, ekz. nacia, regiona aŭ tiu de la urbo kie okazas la prelego. Ĉi-kaze, nia E-flago estos metita maldekstre de la preleganto, dekstre oni metos la nacian, regionan aŭ urban flagon.




- Se la alia flago apartenas al klubo aŭ asocio, ekzemple fervojista klubo invitas prelegi pri Esperanto, ni devas priatenti kie okazas la prelego. Se la akto okazas ĉe esperantista sidejo aŭ en kelka loko ne apartenanta al la klubo kiu invitis la esperantiston prelegi, jen la flagoj:




- Se la prelego okazas ĉe la sidejo de la klubo (ne-esperantista) kiu organizis la prelegon, ekz. fervojista asocio, jen la lokoj de la flagoj:





- Foje, oni decidas pendigi E-flagon sur la muro, post la preleganto. Tiuokaze, la flago devus esti ĝuste pendigita laŭ jene:




aŭ




- Fine, estas necese pritrakti la temon pri la E-flago sur la pupitro uzata de la preleganto por legi notojn dum la parolado. Ofte, ŝokas vidi kiamaniere oni metas la flagon sur la pupitro. Ni vidu, kion ni povas fari kaj male, kie ni ne devus meti la flagon.




Fina konsilo, bv. ne uzi kolorajn aŭ tre videblajn adherajn bendojn por pendigi la flagon, ĉu sur la pupitro aŭ ĉu sur muro. Se necese, uzu travideblajn adherajn bendojn.



# La Angulo de la blazonoj: *Franca Polinezio*

Franca Polinezio estas dependaĵo de Francio en la Pacifica Oceano. El la administracia vidpunkto estas transmara kolektivo kiu posedas propran registaron kaj Asembleon. La teritorio havas reprezentanton en la franca parlamento en Parizo. Tra 150 insuloj loĝas pli ol 200.000 homoj, sendube la plej konata insulo estas Tahitio, ankaŭ aliaj kiel Bora Bora estas tre konataj pro la turismo.



La flago de Franca Polinezio estis adoptita en la jaro 1984. Ties dezajno baziĝas ĉefe sur historiaj tahitiaj flagoj. Meze de la standardo troviĝas belega blazono. Ĝi montras cirklon, kies supra parto konsistas el 10 sunradioj, simbolo de la vivo. Ĉe la suba parto videblas 5 maraj ondoj, reprezentantaj la riĉecon de la arkipelago. Meze aperas impona polinezia boato, kiel tiuj tradicie uzitaj de la polinezianoj por fiŝkapti. Sur ĝi navigas kvin homoj, ĉar kvin estas la insularoj de la tuta arkipelago.



Kaj la flago kaj la blazono estis aprobitaj en la jaro 1984 de la Asembleo de la Franca Polinezio.



Flagoj de Francio, Franca Polinezio, Tahitio kaj tiuj de la franc-polineziaj arkipelagoj en Papeete.

# Buntaj Flagetoj en Tibeto

Norde de Bharato, en Butano, en Nepalo kaj ĝenerale en ĉiuj lokoj kie Budhismo estas majoritata religio, amase videblas buntaj flagetoj. Ili flirtas ĉe popularaj lokoj, kiel merkatoj, placoj kaj ankaŭ en temploj, montoj kaj pontoj. Temas pri la tiel nomataj: preĝ-flagoj kaj ili aperas en jenaj koloroj: blua, blanka, ruĝa, verda kaj flava.



Baŭdanato, unu el la plej sanktaj budhista loko en Katmanduo (Nepalo)

Oni diras, ke ĉi tiuj flagoj aperis eĉ antaŭ la budhisma kredo, laŭdire, ili jam estis uzitaj de la kredo *Bon*, ŝamana kaj animisma religio kiuj ekzistis en ĉi tiu zono ĝis la jarcentoj 8-a / 9-a p.K, tiam Budhismo antaŭeniris dank'al la Tibeta regnolando de la imperiestro Songtsen Gampo. La koloroj uzataj de la budhismaj preĝo-flagoj jam estis uzitaj de la *bon*-kredo kaj ili reprezentas elementojn de la Naturo al kiuj oni petis, pere de la flirtado, protekton kaj prizorgon.

Temas pri la jenaj koloroj kaj elementoj:

- BLUA: reprezentas la ĉielon.
- BLANKA: la akvon.
- RUĜA: la fajron.
- VERDA: la aeron
- FLAVA: la teron.

Nuntempe ekzistas du tipoj de preĝo-flagoj:

- **Horizontalaj:** tiuj kiuj plej oftas. Ili ricevas la nomon *"Lunga tha"* (ĉevalo en la vento). Temas pri kvadrataj flagetoj. Sur ili aperas ĉevalo ĉe kies dorso ĝi portas 3 juvelojn, simboloj de Budho, Darmo kaj Sambo. Sur la flagoj aperas mantroj, formuloj aŭ silabaroj kiujn oni ripetas multfoje per specifa ritmo. Ĉi tiuj horizontalaj flagetoj pendas el longa ŝnuro.



- **Vertikalaj:** nomitaj *"Darchor"* kies signifo estas "pligrandigo de la vivo, la fortuno, la sano kaj la riĉecon de ĉiuj entoj".



Ĉi tiuj flagoj ornamas stratojn kaj templojn kaj ili utilas kiel preĝoj senditaj al la ĉielo. En la kamparo ili troviĝas ankaŭ ĉe la eniro de trapasejoj kaj pontoj, onidire, ĉe tiuj lokoj la flagoj memorigas la neceson peti rajtigon al la dioj por trapasi tiun lokon.



Preĝ-flagoj en Nepalo

# Flagoj kaj Poŝtmarkoj




*Ĉi-numere ni aperigas novan sekcion, temas pri "Flagoj kaj Poŝtmarkoj". Ties celo estas pristudi tiujn poŝtmarkojn kie aperas flago(j). Sendube kelkaj el niaj legantoj ankaŭ estas filatelistoj, do, la temo povas esti interesa.*

## Flagoj de Okupaciitaj Landoj eldonitaj de la Usona Poŝt-servo

Kiam Germanio invadis Pollandon en septembro 1939, tiam komenciĝis la dua mond-milito. Unuamomente Usono sciigis pri sia neŭtraleco, kvankam ĉi tiu lando simpatiis al Britio kaj ceteraj Aliancanoj. Laŭ tiutempaj informoj la 60% el la usonanoj preferis resti neŭtralaj okaze de ĉi tiu eŭropa konflikto, multaj el ili eĉ opiniis, ke la partopreno de usonaj soldatoj en la unua mond-milito estis tragika eraro, pro la fakto, ke en tiu milito mortis pli ol cent mil usonaj soldatoj.

Krome, la Usona Parlamento aprobis en la jaro 1935 la "Leĝon pri Neŭtraleco", kiu malpermesis al la registaro vendi armilojn aŭ pruntedoni monon al militantaj landoj. Malgraŭ tio la Prezidanto Roosevelt aprobis leĝon en la jaro 1941, kiu permesis la aĉeton aŭ pruntedonon de armiloj, tankoj kaj eĉ milit-ŝipoj, al Britio, kondiĉe, ke post la vendo aŭ pruntedono tiuj armiloj estos tuj transportitaj en Britio. Ĉi ĉio ŝanĝiĝis kiam en decembro 1941 Japanio atakis la milit-bazon de *Pearl Harbour* en la Havaja Insularo kaj kelkajn tagojn poste, Germanio deklaris militon al Usono. La nord-amerika ŝtato, post decembro 1941, ekmilitis ĉe du batal-frontoj, en la Pacifika

Oceano kontraŭ Japanio kaj en la nordo de Afriko unue, kaj poste en Eŭropo kontraŭ Germanio.

La usona poŝta servo decidis omaĝi tiujn landojn kiuj estis okupaciitaj de la nazia Germanio, tiel inter junio kaj decembro de la jaro 1943 oni dezajnis kaj eldonis poŝtmarkojn dediĉitaj al Pollando, Ĉekoslovakio, Norvegio, Luksemburgio, Nederlando, Belgio, Francio, Greklando, Jugoslavio, Albanio, Danlando kaj Aŭstrio, ĉiuj ili landoj okupaciitaj de la nazioj. Poste en la jaro 1944 aperis poŝtmarko dediĉita al Koreio, okupaciita de Japanio.



Ĉiuj poŝtmarkoj sekvis similan dezajnon. Kune kun la flago de la lando aperis Fenikso, mita birdo kiu mortas en flamoj kaj renaskiĝas el sia propra cindraro. Ankaŭ aperas virino genuanta kiu levas siajn manojn kun rompitaj ĉenoj. Kiel dirite, ene de la serio da landoj aperas Aŭstrio, tamen en tiu tempo multaj politikistoj opiniis, ke Aŭstrio unuiĝis al Germanio antaŭ la mond-milito tut-libere kaj post referendumo. Nuntempe oni jam scias, ke Germanio uzis sian tutan povon por "konviki" al aŭstriaj aŭtoritatuloj akcepti la aneksadon de Aŭstrio ene de la nazia tria regno, tamen estas necese memorigi, ke okaze de la Konferenco de San-Francisko, kiam en la jaro 1945,

Aliancanoj kaj multaj aliaj ŝtatoj, kompreneble ne tiuj venkitaj dum la mond-milito, renkontiĝis en tiu usona urbo por fondi Unuiĝintajn Naciojn, Aŭstrio, denove sendependa ekde aprilo 1945, ne partoprenis en tiu konferenco.

Pri la poŝtmarkoj mem, indas diri, ke ili kostis 5 cendojn kaj pro la uzo de koloroj la usona poŝta servo kontraktis kun usona kompanio kiu teknike kapablis eldoni mult-kolorajn mon-biletojn kaj poŝtmarkojn.




Nia aktiva kunlaborantino CRISTINA BOLLINI ĵus publikigis jenan libron kun la subtitolo "*Kuriozaĵoj, historio kaj legendoj pri ĉiuj flagoj de la mondo*".


Eldonas: Youcanprint ISBN: 9788831672665

Ne hezitu elŝuti ĉi tiun bitlibron ĉe:


https://www.youcanprint.it/riferimento-curiosit-e-stranezze/flagoj-historio-kaj-kuriozaoj-9788831672665.html

# Veksilologia Terminaro

Laŭ Jaroslav KLEMENT "*Heraldiko, Veksilologio: Terminaro en Esperanto*" *1979*



Rektangula Flago



Kvadrata Flago




Flamforma Flago




Dupinta Flamforma Flago



Tripinta Flamforma Flago



Flamforma Flago kun kvasto



Senpinta Flago




Flago kun dupinta hirunda vosto



Flago kun tripinta hirunda vosto



Flago kun rondforma flirtparto



Labaro



Gonfalono

# La Asocio *VENTO* tre baldaŭ iĝos reala

Estimataj,

kiel vi jam scias malgranda skipo da esperantistaj veksilologoj, tio estas: flagamantoj, decidis antaŭ kelke da tempo krei fakan asocion pri ĉi tiu afero. Ties nomo kompreneble estos *VENTO*, kiu unuamomente signifis *Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo*, tamen nun ĝi temas pri la nomo, sen mallongigoj aŭ akronimoj, de nia baldaŭ asocio.

Pro la fakto ke la revuo publikiĝas en Hispanio, kelkaj tieaj kunlaborantoj de VENTO decidis redakti statuton kiu, post konsidero de ĉiuj interesitoj, estos registritaj ĉe la hispana administracio. Sed atentu, ne temas pri nacia organizo, ĉar ĝi estas tutmonda, tamen estas necese fondi ĝin sur iu ajn konkreta loko.

Jen la proceduro por leĝigi nian novan asocion kaj ankaŭ jen nia invito al ĉiuj por partopreni kaj ĉefroli en ĝi:

1) Ĉi tie vi povos legi la proponitan statuton. Kiel dirite, temas pri statuto redaktita por esti aprobita en Hispanio, do, eble kelkaj aferoj povas ŝajni fremdaj al iuj. Tamen, memoru, ke oni bezonas registri la asocion sur konkreta lando en la mondo. Ni elektis Hispanion, ĉar la plimulto el la iniciantoj de ĉi tiu asocio estas hispanoj.

2) Se vi deziras modifi, enmeti aŭ forviŝi ion, bv. skribi al jena adreso: cordoba@esperanto.ac kun via propono. Same, se vi

konsentas kun la proponita statuto kontaktu kun ni por sciigi, ke vi estas preta kunlabori kun ĉi tiu nova asocio.

3) Bv. fari tion antaŭ la 10-a de decembro 2020. Post tiu dato ni informos al ĉiuj interesitoj pri onta interreta renkontiĝo. Tiu akto estos la oficiala unua renkontiĝo por krei VENTO-n.

4) Dum tiu renkontiĝo oni sciigos al ĉiuj pri la sanĝoj proponitaj al la statuto kaj ĉiuj partoprenantoj rajtos voĉdoni.

5) Poste, ni redaktos akton pri la renkontiĝo kaj kune kun la statuto aprobita ni petos al la hispana administracio la registrigon de VENTO.

Do, ne hezitu kunlabori kun ni, legu la statuton, sendu viajn opiniojn kaj vian pretecon partopreni en la renkontiĝo al ĉi tiu ret-adreso cordoba@esperanto.ac. Ni serĉos taŭgan horon kaj daton por ĉiuj eblaj partoprenantoj en la mondo.

*Amike Via, la VENTO-skipo.*

**Ĉu esperantisto kaj flag-amanto?**



**Do, VENTO estas via asocio.**

cordoba@esperanto.ac

# Kiel kunlabori kun VENTO:

✓ Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio, ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, fotojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti redaktitaj en la internacia lingvo Esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj aŭ ĝenerale pri heraldiko, ĉi tiuj simboloj devas aperi ankaŭ ene de flago por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

✓ Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditajn de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas, ne povas esti prenitaj el interretaj paĝoj. En tiuj fotografaĵoj devas aperi flago(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ pri la dato de la fotografaĵo.

✓ Okaze de la sendo de artikolo aŭ informo, la aŭtoro devas eviti fari favorajn aŭ malfavorajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo, regiono aŭ asocio de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn aŭ movadojn.

✓ La revuo estas tute senpaga, do, pro la sendo de kontribuaĵo oni ricevas nenian kontraŭ-pagon. Kompreneble, la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn sur la artikolo.

✓ Memoru, ke niaj elektronika adreso estas: cordoba@esperanto.ac kaj nia poŝta adreso:
*Revuo VENTO*
*Apartado de Correos 3142*
*E-14080 Córdoba (Hispanio)*

# Veksilologia humuro




Notu la adreson de nia revuo: cordoba@esperanto.ac

La adreso estis afable havigita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La poŝta adreso daŭras esti valida, jen ĝi:

Revuo VENTO. Apartado de Correos 3142. E-14080 Córdoba (Hispanio).

Artikoloj, kritikoj kaj kiu ajn kunlaboro estos ĉiam bonvenaj.


VENTO
Via veksilologia informilo en
ESPERANTO